# esperanto aktuala


Revuo de la **E**sperantista **B**rusela **G**rupo Numero 1 / 2016




# Bonan jaron 2016 ! Ni deziras al vi ĉiuj sanon, vojaĝojn, sukcesojn, ... ... kaj rilatigadojn !




**Ni parolu, komuniku, ... por estigi ligojn kaj rilatojn inter ni ;)**



3 homoj, 3 linioj | 4 homoj, 6 linioj | 5 homoj, 10 linioj | 6 homoj, 15 linioj



7 homoj, 21 linioj | 8 homoj, 28 linioj | 9 homoj, 36 linioj | 10 homoj, 45 linioj



11 homoj, 55 linioj | 12 homoj, 66 linioj | 13 homoj, 78 linioj | 14 homoj, **91** ligebloj

# K O L O F O N O

41a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : https://sites.google.com/site/ebgaktuala/
**Prezidanto** : JM Nicolas de BUYL : prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com
**Sekretario** : Laurent Loisse sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj :** Françoise Pellegrin fransuaz@esperantobruselo.org
**Eventoj :** JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Retejo de EBG : www.esperantobruselo.org**
**Abona membriĝo** : 12 aŭ 18 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo
**Kunvenejoj** : 1° ĉe **«De Pianofabriek» (DPf)** : Rue du Fort-straat 35, en 1060 Bruselo, Metroo : Parvis de St-Gilles/St-Gillis Voorplein
2° ĉe la **Eŭropa Komisiono (EK)** : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo - Metroo Maelbeek/Maalbeek



# A G E N D O

*Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur la Kalendaro de la Brusela grupo*

**Kursoj kaj kunveno okazas ĉiumerkrede ekde la 16a de Septembro,** en nia **nova** kunvenejo:
**De Pianofabriek**, 35 rue du **Fort**straat, 1060 Bruselo.
Informoj ĉe fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28

**EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,**
**bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981**

## JANUARO

| | | |
|---|---|---|
| **Sabato la 9a** | **14:00 - 16:00** | **Konversacia rondo en Dilbeek** Lydia Buyst : 054 33 01 51 |
| **Lundo la 11a** | **19:00 - 22:00** | **Babilemaj Spagetoj** aliĝo surrete aŭ mlaitat@yahoo.fr<br>**Garden City,** Place de la Liberté 6, 1000 Bruselo |
| **Merkredo la 13** | **18:30 - 20:00** | **Kantateliero** kun Laŭrenzo **(DPf)** |
| **Merkredo la 27** | **18:30 - 20:00**<br>**(DPf)** | **Prelego** de Bernard-Regis Larue<br>pri **sia vojaĝo en Indonezio (2a parto)** |

## FEBRUARO

| | | |
|---|---|---|
| **De la 5a ĝis la 7a** | | **72a Studsesio en Hersberg am Harz, Germanio**<br>Pri novaj teknikoj por lingvoinstruado kaj komunikado, Vikipedio. Lingva perfektigo |
| **Sabato la 6a** | **14:00 - 16:00** | **Konversacia rondo en Dilbeek** Lydia Buyst : 054 33 01 51 |
| **Lundo la 8a** | **19:00 - 22:00** | **Babilemaj Spagetoj** aliĝo surrete aŭ mlaitat@yahoo.fr<br>**Garden City,** Place de la Liberté 6, 1000 Bruselo |
| **Merkredo la 10** | **18:30 - 20:00** | **Babilronda kunveno** (VM2 ĉe Eŭropa Komisiono) |
| **Merkredo la 17a** | **18:30 - 20:00**<br>**(DPf)** | **Prelego :** de Giorgio Silfer pri **la libro «Historio de la Esperanta literaturo» sekvota de tostado** |

## MARTO

| | | |
|---|---|---|
| **Merkredo la 2** | **18:30 - 20:00**<br>**(DPf)** | **Prelego** de Bernard-Regis Larue<br>pri **la Regiono de Yelowstone** |
| **Sabato la 5a** | **14:00 - 16:00** | **Konversacia rondo en Dilbeek** Lydia Buyst : 054 33 01 51 |
| **Lundo la 14a** | **19:00 - 22:00** | **Babilemaj Spagetoj** aliĝo surrete aŭ mlaitat@yahoo.fr<br>**Garden City,** Place de la Liberté 6, 1000 Bruselo |
| **Merkredo la 16** | **18:30 - 20:00**<br>**(DPf)** | **Prelego** de Marc Vanden Bempt<br>pri **Hungario 1956** |

## Saluton Kara Legantaro !

Antaŭ nelonge ni malkovris iun strangulon el Aŭstralio: Evildea (*paĝo 13*). Li faris alvokon perrete al Esperantistoj por ke ili kreu eventon okaze de la Zam'Tago, la 15an de Decembro, uzante la kradvorton «#EsperantoLives» surrete kaj farigante filmetojn pri siaj Eo-spertoj. Mojosa Evildea estas kaj li sukcesis trafi multajn homojn ! Ankaŭ, ĉi-lastan jaron, ni observis signifan evoluon de la Eo-movado danke al multaj novuloj (nuntempe pli ol 225.000 lernantoj ĉe duolingo ekde nur kelkaj monatoj !). Pro tio, ni dankas la Esperantiston de la jaro 2015 Chuck Smith (*paĝo 10*) !







Bonan jaron kaj daŭrigon al ĉiuj ! 

*Viaj redaktoroj*
aktuala@esperantobruselo.org







## Enhavo

Paĝo 2 : Homaj ligebloj
Paĝo 3 : Kolofono kaj Agendo
Paĝo 4 : Edito kaj Enhavo
Paĝo 5 - 7 : La kasteleto de nenie
Paĝo 8 - 9 : JES-raporto
Paĝo 10 : Poliglotaj kafejoj
Paĝo 11 : Gratulon al C. Smith
Paĝo 12 : Bet-52 en Litovio
Paĝo 13 : Evildea kaj Sara
Paĝo 14 - 15: HungaroMania
Paĝo 16 : Vinilkosmo Abonklubo
Paĝo 17 - 19 : 88-a SAT kongreso
Paĝo 20 : 2016 multkolore !

# La Kasteleto de nenie - 2a parto



Novelo verkita de Miŝel Laitat

(daŭrigo) Subite Mateo vekiĝis.
Li aŭdis ion. Li malfermis la okulojn. La suno jam brilis en la ĉielo. « Kokeriko » kantis la koko. Koko? …, diris Mateo al si mem. Hieraŭ Ĝiorĝio diris ke estis nek birdoj nek bestoj ĉi tie. Sed jes, estas koko kaj mi tre bone aŭdas ĝin. « Kokeriko » denove kantas la koko. Sed … Ĉu mi bone aŭdas?…, diris Mateo al si mem. Li stariĝis kaj aŭskultis. "Kokeriko". Li fakte bone aŭdis.
La kokokanto venis ne de ekstere sed de la koridoro. Mateo alproksimiĝis la pordon kaj malfermis ĝin. Stuporo. Li tuj refermis ĝin kaj kuris veki sian fraton.

- Ĝiorĝio, Ĝiorĝio, vekiĝu, vekiĝu rapide.
- Kio ? Kio okazas Mateo ?
- En la koridoro… Estas dekoj da personoj kiuj paŝas en la koridoro. Venu vidi.

Ĝiorĝio stariĝis kaj alproksimiĝis la pordon. Li malrapide malfermis ĝin kaj, fakte, vidis dekojn da personoj alpaŝantaj la ŝtuparon.

- De kie venas tiuj homoj ? demandis Mateo. Hieraŭ estis neniu ĉi tie kaj nun estas dekoj, centoj da personoj kiuj paŝas tra la koridoron.
- Mi ne scias de kie ili venas, sed ŝajne ili iras en la ĝardenon.
- Aspektante tiel malĝojaj, ili fikse rigardas antaŭ sin kaj ŝajnas eĉ ne vidi nin.

Post kelkaj minutoj ĉiuj tiuj strangaj personoj estis for. Ĉe la alia flanko de la koridoro, maljuna viro malfacile paŝis helpe de siaj lambastonoj. Ĝiorĝio volis kompreni kio okazas. Li demandis la maljunulon.

- Saluton Sinjoro, Ĉu vi povas diri …
- Ne, ne, mi ne havas tempon. Mi estas malfrue, tre malfrue, Ili komencos, ili komencos, mi estas malfrue, tre malfrue.

La du fratoj rigardis la maljunan viron kiu malsupreniras pli malpli bone la ŝtuparon. Ili sekvis lin, sen kompreni.
Ĝiorĝio estis jam en la mezo de la ŝtuparo kiam li aŭdis sian fraton krie revoki lin.

- Ĝiorĝio ! Ĝiorĝio ! Rigardu ! Rigardu.
- Kion ? Kion mi devas rigardi ?
- La pentraĵojn.
- Kio estas pri la pentraĵoj ?
- Rigardu, rediris Mateo. La ĝardenoj, la arboj, la domoj ankoraŭ estas sur la pentraĵoj sed ne plu la homoj. Ne plu la homoj !

Fakte ! Ĉiuj homoj malaperis el la pentrajoj. Nur restis la dekoro.

- Tio signifas ke … Ne, ne eblas ! Ne povas esti ! Ĉiuj homoj kiujn ni vidis pasi estas tiuj de la pentraĵoj.

- NEEEE ! kriis Mateo terurita. Ne eblas ! Estas science neeble ! Tute neeble.

Ili ne havis tempon por plu polemiki ĉar subite muziko invadis la kasteleton. La du fratoj rigardis sin reciproke kaj senprokraste ekkuris ĝis la ĝardeno.

Tie, plej surpriza spektaklo atendis ilin. Preskaŭ alveninte ekstere, ili haltis, la buŝojn larĝe malfermitaj pro mirego. Tie, antaŭ ili, ludis granda simfonia orkestro. Violonoj, violonĉeloj, kontrabasoj, harpo, flutoj, klarnetoj, fagotoj, hobojoj, trumpetoj, perkutinstrumentoj, nenio mankis. Tie, sur la gazono, la muzikistoj perfekte ludis kun nekredebla kvalito unu el la plej famaj simfonioj iam komponitaj. Sed la plej nekredebla afero estis la dirigento. Knabeto kun pantaloneto staranta sur piramida ŝtono plej bone direktis la orkestron, eĉ pli bone ol Ĝiorĝio povus iam mem fari.

Dekojn da fojoj Ĝiorĝio direktis ĝin. Centojn da fojoj li aŭskultis ĝin direktata de aliaj. Sed neniam, vere neniam, li aŭdis ĉi tian perfektecon. Ŝajnis al li, ke ĉiu noto trapasas lian korpon por profunde karesi lian animon. Tiu muziko transportis lin al nekonata mondo. Li ne plu estis viro. Li ne plu estis homo. Li estis muziko. Li estis parto de la kosmo.

Ĉirkaŭ la orkestro, infanoj, virinoj kaj viroj fervorege aŭskultis. Iliaj vizaĝoj, nelge senbrilaj kaj malfreŝaj, nun ĝojradiis plenplenaj de vivo. Super ili, flugis miloj da multkoloraj birdoj kvazaŭ ili volus unuigi la teran kaj la ĉielan mondon. Iom pli for, eta vento trapasis la arbaretojn kaj venis karesi florojn kaj arbetaĵojn. La naturo ankaŭ partoprenis al la festo.





Alegro, andanto, skerco, presto, la simfonio finiĝis. La muzikistoj stariĝis kaj malrapide foriris kun la spektantoj. Kelkiuj kuniĝis iom pli for kaj formis kvartetojn aŭ kvintetojn kaj ree ekludis. Kelkiuj aliaj sole ludis sian violonon aŭ violonĉelon. La spektantoj promenis de orkestreto al orkestreto.

Ege kortuŝita, Ĝiorĝio returnis sin kaj rigardis sian fraton. Mateo estis terurita. Li ŝvitis. Li rigardadis ĉirkaŭ si kun freneza rigardo.

- Foriru ni, Ĝiorĝio. Foriru ni tuje.
- Mi neniam vidis vin tiel ĉi, Mateo. Kio okazas ? Kial vi timas ? Ĉiuj tiuj personoj estas tre afablaj kaj treege bone muzikludis.
- Se vi ne foriros nun kun mi, mi sole iros for.

Dum la du fratoj parolis, la knabo saltetis el sia piramida ŝtono kaj alproksimiĝis al Ĝiorĝio.

- Saluton Ĝiorĝio, diris la knaba dirigento.
- Ĝiorĝio, vi diris ? Ĉu vi konas min ?
- Kompreneble. Ni atendis vin, Ĝiorĝio.
- Vi atendis … min ?
- Jes ja, vin.

- Ne eblas.
- Tamen veras.
- Sed, kie ni estas ĉi tie ? Kio estas ĉi tiu loko ? Kio estas tiu kasteleto ?
- Tio estas malsanulejo.
- Malsanulejo ? Sed ni vidis nek kuracistojn, nek flegistojn, nek medicinaĵojn.
- Vi malbone komprenas, Ĝiorĝio. Tio ne estas malsanulejo por la homoj, sed por la animoj. La flegistoj estas la muzikinstrumentoj, la medicinaĵoj estas la muziko kaj la kuracistoj nomiĝas Mozart, Beethoven, kaj ankoraŭ multaj aliaj. Vi estas komponisto, ĉu ne ? Ni bezonas vin. Ni bezonas novajn muzikverkojn. Restu kun ni, Ĝiorĝio.
- Kiu vi estas, demandis Ĝiorĝio ?
- En via koro, vi certe jam scias kiu mi estas, ĉu ne ?

La knabo ridetis, kaj poste ankoraŭ aldiris

- Vi povas foriri aŭ helpi nin, sed via elekto estos nenuligebla. Resti kun ni por ĉiam aŭ foriri sen ebla reveno. Vi elektu.

La knabo ankoraŭ ridetis, turnis sin kaj malrapide foriris por kunigi la muzikistojn.

- Foriru ni, kriis Mateo.
- Sed …
- Ne ! Foriru kun mi. Tiuj homoj estas frenezuloj ! Estas malsanulejo, jes ja, sed

psikiatra malsanulejo. Venu, Ĝiorĝio, venu kun mi. Nun !

- Ĉu vi povas imagi la plenecon kiun mi travivis dum la koncerto ? Estas ne kredeble. Neniam mi spertis tiaĵon. Mia vivloko estas ĉi tie, Mateo. Mi certas.
- Ne, Ĝiorĝio !
- -Jes, Mateo. Mi amas vin, sed mi ne povas foriri. Neniam plu.

Mateo retroiris malrapide kun teruritaj okuloj. Subite, li turnis sin kaj kuris ĝis la aŭto. Li enaŭtiĝis, ekveturis kaj rapidege foriris. Li tre malfacile kredis tiun historion. Ĉu li ankoraŭ sonĝis ? Ne, tute ne. Ĉu li povis forlasi sian fraton ? Ankaŭ ne. Milfoje ne.

Mateo bremsis. Li sentis sin senkuraĝa. Li ne povas forlasi sian fraton tie ! Li denove direktis sin al la kasteleto. Li veturis, veturadis kaj ankoraŭ veturadis. Li ne retrovis la muron de la bieno. Li turnis, returnis, reiris tien kaj reen, kaj ĉien, sed li ne plu retrovis la kasteleton.

Subite, li haltis. Io brilis ne for de la veturilo. Li elveturiliĝis kaj levprenis la brilan aĵon. Nekredeble ! Estis la brakhorloĝo de Ĝiorĝio ! Li tre bone memoris. La antaŭvesperon li vidis sian fraton demeti sian brakhorloĝon kaj meti ĝin sur la noktotablon. Kio signifis tion ? Li ne komprenis. Li ĉirkaŭrigardis kaj rimarkis ankoraŭ ion ne tre malproksime. Li alproksimiĝis tion kaj …

La piramida ŝtono ! La piramida ŝtono sur kiu la knabo direktis la orkestron ! Mateo finfine komprenis. Ĉi tie estis la kasteleto antaŭ unu horo. Nun ĉio malaperis, la kasteleto, la gazonoj, la statuoj kaj ankoraŭ ĉiuj strangaj homoj kaj lia frato, Ĝiorĝio.


Tie en la mezo de la stepo, en la mezo de nenie, Mateo ploris. Li sciis ke li neniam plu vidos sian fraton sed ke Ĝiorĝio estos feliĉega.



# JES 2015-2016

Ĉi-foje via reportisto de esperantaj renkontiĝoj ne iris al la novjara renkontiĝo sed al la Junulara Esperanto-Semajno (JES) kiu ankaŭ tradicie okazas dum novjaro !

Malgraŭ la kutimo ke tiu renkontiĝo okazu en Germanio aŭ Pollando, la JES ĉi-jare okazis en Eger, eta sed ĉarma urbo en Hungario, ne tre for de Budapeŝto. Por la plej forlandaj partoprenantoj tio estis okazo viziti Hungarion en la vintra atmosfero.









En la programo, multaj diskutrondoj, manlaboron, ludojn (supra bildo), kaj la «kulinarfestivalo» (maldekstra foto), dum kiu ĉiu partoprininto devis prezenti al la aliaj manĝaĵoj de sia lando.
Proponitaj ekskursoj : turka banejo kaj vingustumado (suba foto).












Dum la tuta semajno multaj muzikistoj ekzercis kaj pli-malpli oficiale koncertis. La muzika programo estis ege varia kun klasika muziko (piano, fluto, Gaevan kun si klarineto), Ĝaz-muziko (Melono, la Slezak fratoj en la supraj bildoj), kaj propraj esperanto-kantoj (Platano, Ĵele). Kaj pli specife dum la novjara balo, kelkaj lokaj muzikistoj prezentis kvalitan koncerton de tradicia folk-muziko.
Sube : la organiza teamo



# Poliglotaj kafejoj en daŭreblaj ejoj

Diversaj kulturaj asocioj grupiĝis en Mundo-B (havas domojn en diversaj urboj de EU mastrumataj de www.ethicalproperty.eu kaj tie havas komunan bibliotekon pli facile alireblaj por la membroj de diversaj asocioj. Ĉu bona momento por Esperanto-asocioj kiuj volas lupreni lokon tie ?

**POLIGLOTA KAFEJO :** Jam antaŭ kelkaj jaroj esperantistoj el Bruselo partoprenis al konversaciaj tabloj en la kadro de « Cercle polyglot ». Aldoniĝos nun nova iniciato ene de Mundo-B kie oni kunvenos vespere, post la laboro por babiladi ĉetable. La ĉeestantoj nenecese konas unu la alian, sed ili havas saman ŝaton al la lingvoj. Ili deziras plibonigi iliajn sciojn de fremdaj lingvoj. Kiel eksterlandanoj, ili plezuras kundividi sian hejman lingvon aŭ ekregi novajn vortojn el aliaj lingvoj.
Tia estas la koncepto de la poliglota kafejo, kiu regule okazos en B-Mundo en Bruselo.




*(NdlR: Dankon al Herman Deceŭninck kiu sendis al ni la informon)*



# Esperantisto de la jaro 2015 : Koran Gratulon al Chuck Smith !



**Chuck Smith** (*NdlR: ĉie-tie dankanta al #EsperantoLives-partoprenintoj kaj Esperantujo*), la 36-jara usona komputisto loĝanta en Berlino, fondinto de la Esperanta Vikipedio (2001) kaj eksestrarano de TEJO, estas proklamita la Esperantisto de la jaro 2015 pro ampleksa diskonigado kaj utiligado de Esperanto en interreto, precipe, pro ĉi-jara pretigo kaj lanĉo de Esperanto-kurso por anglalingvanoj ĉe la lingvolerna retejo Duolingo, kie dum kelkaj monatoj Esperanton eklernis pli ol 200 mil personoj.

En la februara kajero de *La Ondo* aperos intervjuo kun Chuck Smith, kiun ni gratulas okaze de la laŭreatiĝo.
La internacia sendependa magazino "La Ondo de Esperanto" en 1998 iniciatis ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

En ĉi tiu jaro 17 kandidatigantoj proponis 21 kandidatojn, al kiuj 16 elektantoj jene donis la voĉojn:
**Chuck Smith 12 voĉoj**
Stefan MacGill 5 voĉoj
Carlo Minnaja 4 voĉoj

Du kantidatoj ricevis po du voĉojn, kvin kandidatoj ricevis po unu voĉon.

LA ONDO DE ESPERANTO

**Proponantoj**

Marija Belošević (Kroatio): vic-prezidantino de IKUE
Renato Corsetti (Italio): kasisto de IEF
István Ertl (Luksemburgio): tradukisto ĉe Eŭropa Revizora Kortumo
Judit Felszeghy (Hungario): ekssekretario de la Esperanta PEN-Centro
Edmund Grimley Evans (Britio): eksprezidanto de EAB
Maritza Gutiérrez González (Kubo): estro de la Esperanto-redakcio de Radio Havano
Dafydd ab Iago (Belgio): eksdirektoro de la Brusela Komunikadcentro de EEU
Aleksander Korĵenkov (Ruslando): ĵurnalisto kaj verkisto
Lee Jungkee (Koreio): direktoro de Seula Esperanto-Kulturcentro
Vinko Markovo (Francio): prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT
Valentin Melnikov (Ruslando): poeto, ĵurnalisto, tradukanto
Nguyen Xuan Thu (Vjetnamio): direktoro de Komisiono pri Homaj Nomoj de Akademio de Esperanto
Barbara Pietrzak (Pollando): radioĵurnalisto, redaktoro
James Rezende Piton (Brazilo): konsilanto de BEL
Franciska Toubale (Aŭstralio): kunlaboranto de la radio 3ZZZ
Sibayama Zyun'iti (Japanio): vicprezidanto de JEI, ĉefredaktoro de *La Revuo Orienta*
José Antonio Vergara (Ĉilio): estrarano de UEA
Paulo Sergio Viana (Brazilo): tradukanto kaj preleganto

Halina Gorecka,
sekretario



# La 52-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj

**Litova Esperanto-Asocio afable invitas vin partopreni tradiciajn la 52-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-52). La aranĝo okazas sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio (UEA).**

**De la 2a ĝis la 10-a de Julio 2016**. BET okazas ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio.

BET-52 okazos en la urbo **BIRŠTONAS**, kiu situas 40 kilometrojn for de **Kaunas** kaj 90 kilometrojn for de la ĉefurbo de Litovio **Vilnius**, apud la ĉefa rivero de Litovio **Nemunas**. Ĝi situas en la centro de la regiona nacia naturparko, ĉirkaŭita de belegaj pinarbaroj. BIRŠTONAS estas antikva kaj fama balneologia kuracloko de Litovio, fondita en 1382. La urbo estas ideala loko por laboro kaj ripozo, ĝi estas facile atingebla buse kaj automobile. Eblos uzi multegajn (pli ol 50) diversajn kuracajn kaj sanigajn procedurojn kaj servojn, naĝejon, saŭnon, sportan salonon k.a.



**PROGRAMO:** tradicia, t.e. somera universitato, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri situacio kaj problemoj de Esperanto-movado en baltiaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo, sciencteknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj, ripozado en naturo, diskutoj, forumoj, libroservo, diservo, interkona vespero, baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, oficiala malfermo kaj fermo, adiaŭa vespero. www.esperanto.lt/aligxilo_BET.html

www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET52

***Bonvenon al Litovio !***

# Kion alportas altsciencteknikо al Esperantujo ?
# Intervjuo al Richard Delamore... Hmm, ... alinome «Evildea» ! :)

Altsciencteknikо multe ŝanĝis nian ĉiutagan vivon. Sed kion alportas altsciencteknikо al Esperantujo? Pri tio Pluveta (*NdlR: Eo-ĵurnalisto ĉe CRI*) intervjuis Richard Delamore, kiu estas administranto de Esperanto-televidkanalo en YouTube. En la 100-a UK okazinta en Lilo, Richard Delamore akceptis diplomon de UEA pro la realigo de la reta Esperanto-Televido. Nun bonvolu aŭskulti la rapoton de Ĉina Radio Internacia, musklakante ĉi-tie .

Ĉu indas malstreĉita, mojosa, laŭmoda kaj amuza maniero por vivigi, konigi kaj disvastigi Esperanton ? Se vi konsentas, subtenu lin ! Eĉ 1 aŭ kelkaj € monate https://www.patreon.com/evildea?ty=h








CRI online | ESPERANTO


E-literaturo Por amantoj de nia beletro: ampleksa intervjuo kun la du aŭtoroj de *Historio de la Esperanta Literaturo* kaj eseeto pri *Poemo de Utnoa* 10

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

esperanto

109-a jaro • n-ro 1298 (1) » Januaro 2016

Sara Spanò: La nova gvidanto de la AMO-seminarioj

Ekkonu la ideojn de la baldaŭa nova gvidanto de la AMO-seminarioj, certe la plej efika agado de UEA en la lastaj tempoj.


6

En la revuo «**esperanto**» ĉi-monate, vi malkovros tuj legindajn artikolojn!

*Dek Demandoj al* **Sara Spanò**, kiu baldaŭ fariĝos la nova gvidanto de la ***AMO***-seminarioj, parolas ne nur pri trejnado, sed ankaŭ pri eksteraj rilatoj kaj aliaj temoj.

Aliaj artikoloj : Novjara mesaĝo de Mark Fettes; partopreno de UEA en la ĝenerala konferenco de Unesko; raportoj pri venonta UK 2016, pri 9-a Andaluzia Kongreso; FEJ kaj la studenta movado por homaj rajtoj en Filipinoj; notoj pri interesaj eventoj, agadoj, homoj (kiel Mireille Grosjrean, ..), ktp....

# HungaroMania, dimanĉon la 28-an de februaro 2016






La Lingva Festivalo en Loveno (Leuven - Louvain), sukcese okazinta kvarfoje inter 2008 kaj 2013, estas bone konata.
Pro tio ke la partoprenantaro restis senkreska, Esperanto 3000 decidis ne daŭrigi la serion laŭ la sama formato.
En februaro 2016 anstataŭigas ĝin [HungaroMania](). Tio estas evento organizata ĉirkaŭ unu lingvo, ĉi-kaze la hungara, en kiu Esperanto ankaŭ rolas.

Ĝi unuavice celas la Beneluksanojn kiuj parolas la hungaran aŭ interesiĝas pri la hungara kaj Hungario. Al ili ne volas montri ke Esperanto ekzistas kaj vivas, uzante ĝin interalie en la retejo, en kelkaj alparolaj frazoj, per kelkaj vendataj libroj kaj per informpanelo.



En Loveno kaj Alsto (Aalst - Alost) eblas partopreni kursojn pri la hungara, tial la tiea instruistino **Hedwig Gerits** kunorganizas la eventon.

Ankaŭ la direktoro **István Csonta** de la Collegium Hungaricum Leuven kunorganizas.
La Collegium Hungaricum estas tre konata en la hungara vivo en Loveno. En tiu ĉi studenta domo loĝas ĉiun jaron multaj hungarlingvaj studentoj, kiuj pli aŭ malpli longe studas en Loveno.
La kunlaboro de Esperanto 300 estas evidenta pro la tradicio de Lingvaj Festivaloj. Kaj Hedwig Gerits reprezentas la hungarajn lingvokursojn kaj la flandrajn kursanojn.

Krome subtenas la eventon kaj iel kunlaboras ne nur la urbo Leuven, sed ankaŭ la hungara kultura Balassi Instituto, la hungara ambasadejo en Belgio, la hungara lernejo kaj la revuo *Most Magyarul!* kaj multaj lokaj kunlaborantoj kaj kursanoj pri la hungara.
Kune ili ellaboris la ideon pri Lingva Festivalo kun la hungara kiel centra gastlingvo. Naskiĝis HungaroMania.

En HungaroMania la hungaraj lingvo kaj kulturo estas la fokusa centro. La programo ankoraŭ povas iom ŝanĝiĝi, sed

jam grandparte formiĝis. Ĝi enhavas tri gravajn pilierojn.



La unua piliero estas prilingva sesio. **Emese Pogány** prizorgos hungarlingvan laborgrupon por instruistoj pri la hungara. Emese laboras ĉe la somera universitato de Debrecen.
Tiu universitato havas multjaran tradicion pri la instruado de la hungara al alilingvanoj.
Aldone al tiu laborgrupo, Hedwig Gerits prezentos la hungaran lingvon al nederlandlingvanoj, laŭ la stilo de la Lingva Festivalo. La partoprenantoj al HungaroMania tiel povos gustumi la riĉan kaj logikan hungaran lingvon.

La dua piliero prezentas la hungaran kulturon. Kiel ĉefa ero la programo prezentas la hungaran grupon el Transilvanio, «***Ego Sum***». Ili proponas varian programon de nuntempa hungara muziko. La prezentado de ĉi tiu grupo estas premiero por la Benelukso!
Vespere ni organizos veran hungaran *táncház* aŭ dancadon. Spertaj dancistoj gvidos nin tra niaj unuaj hungaraj dancpaŝoj.



La hungara kulturo enhavas pli ol kantado kaj dancado. Ankaŭ la hungara kuirejo estas grava ĝia ero. La partoprenantoj vespero ĝuos hungaran vespermanĝon (inkluzivan en la kotizo). La tutan tagon ankaŭ funkcios trinkbudo, kie hungara vino kaj biero haveblos je bela prezeto.
Apud la hungarajn lingvon kaj kulturon ni volas prezenti niajn eminentajn gastojn. La hungara ambasadoro en Belgio, Nagy Zoltán, jam konfirmis sian ĉeeston, kun prelego. Ankaŭ ĉeestos Rik Torfs, la rektoro de la KU Leuven.

La tria piliero konsistas el la tuttagaj aktivecoj. Funkcios minimerkato, kie reprezentantoj de hungaraj produktoj konatigos siajn specialaĵojn al la publiko. Aldone viziteblos ekspozicio pri Hungario, kie ankaŭ la hungara lingvo kaj Esperanto ĉeestos. Videblos ekspozicio pri la hungara Kultura Mondheredaĵo de Unesko. La partoprenantoj krome povos partopreni en kvizo en kiu ili solvu dekon da demandoj per la informoj haveblaj surloke.

Eblas aliĝi jam nun pere de la retejo hungaromania.eu. Antaŭaliĝo kostas 10€, surloke oni pagas 12€. Infanoj (ĝis 12-jaraj) havas 50%-an rabaton. La kotizon eblas ĝiri al la konto (iban) BE97 7350 4021 2649 (bic) KREDBEBB je la nomo de HungaroMania.
Ni esperas ke tiu ĉi ege interesa programo, kvankam celanta Esperanton nur flanke, konvinkos vin partopreni en nia evento!
István Csonta, Hedwig Gerits, Marc Vanden Bempt (Esperanto 3000 vzw Leuven).

**Retejo:** www.hungaromania.eu/eo
**Adreso:** Ontmoetingscentrum Genadedal, *Velderblok 2A, Leuven (Kessel-Lo)*

HUNGAROMANIA

# Vinilkosmo Abonklubo

**Nova objektivo 200%, aldonos donacojn al tiuj kiuj donis suficxe por kovri sendokoston.**

### Kio ĝi estas?

Vinilkosmo lanĉas novan koncepton: temas pri klubo por aboni esperanto-muzikon laŭ diversaj abonformuloj.

### Kial?

Lastajn du jarojn la diskeldonejo suferis pro la diskokrizo. Estis drasta disfalo de la vendoj. Vinilkosmo adaptiĝas al la evoluo proponante solvojn por daŭrigi produktadon de esperanto-muziko. Tial en junio 2009, la retejo vinilkosmo-mp3.com kreiĝis por vendi virtulajn albumojn. Sed la vendado de virtuala albumo tute ne estas komparebla kun la antaŭa vendado de KDoj. La nuntempa epoko lasas la paŝon al la elsendfluo (streaming) por aŭskulti muzikon. Helpe de partnero 1D touch, ni havis eblecon eniri tiun mondon. Tiu nova afero ne solvos la problemon. Ni bezonas pli da homoj kiuj aktive subtenas esperanto-muzikon. Aboni estas aktive kontribui al esperanto-muziko tiel ke Vinilkosmo povos daŭrigi la produktadon kaj eldonadon.

### Kial 1D touch ?

1D touch (1D tuŝ) estas elsendflua platformo dediĉita al la sendependa kulturkreado.

Tiu ĉi netipa kaj justa elsendfluejo strebas reinventi novajn kundividajn regulojn de la valoro en la bita erao por la subteno de la artistoj kaj sendependaj produktistoj. La kutima elsendfluo pagas la artistojn malmultege. Kompareble 1D touch pagas 40-oble pli la artistojn ol Spotify kaj Deezer.

### Kiel funkcias?

Abono validas por 1 jaro (de la 1a de januaro ĝis la 31a de decembro) kaj necesas renovigi la abonon antaŭ la jarfino por la sekva jaro por daŭrigi ĝin. Se vi aliras 1Dtuŝ vi havos la kompletan katalogon de Vinilkosmo (pli lo 100 albumoj en esperanto!) La abonantoj profitos ankaŭ pri la katologo de multegaj aliaj sendependaj eldonejoj kun la plej bunteca diverseco kiu famigis ilin (tio estas 50.000 artistoj, 1.000.000 muzik-titoloj, el 7.000 sendependaj eldonejoj).

### Kiujn servojn proponas Vinilkosmo Abonklubo ?

Aliron al la katalogo de Vinilkosmo laŭ la elekto de la abonformulo kaj laŭ diversaj formatoj disponeblaj ĉe:

vinilkosmo.com (KD) / vinilkosmo-mp3.com (MP3, OGG aŭ FLAC) / music.1dtouch.com (1D tuŝ )

### Kion celas ni?

La celo estas atingi 100 abonantojn ĝis la 15 de februaro 2016.

Bonvenon al la Vinilkosmo Abonklubo! Dankegon pro via aktiva subteno al Esperanto-muzikproduktado kaj eldonado.

***La Vinilkosmo-Teamo***

# La 88-a **SAT-Kongreso** de la 8a ĝis la 15a de Aŭgusto




Okazis en la slovaka urbo Nitra situanta 90 km for de la ĉefurbo Bratislava.
La eventon partoprenis pli ol kvindeko da esperantistoj el dek ok landoj. La plej foraj kongresanoj alvenis el Aŭstralio, Argentino, Ĉinio, Japanio, Koreio, Madadaskaro kaj Usono. Inter la partoprenantoj estis pluraj gejunuloj, kiuj aktive intervenis kaj kontribuis al la programo.



Bonvenigis nin la ĉeforganizanto de la kongreso Peter Baláž.
La kongresejo troviĝis en la universitata student-hejmo "Anton Bernolák".
En la akceptejo estis instalitaj tri libroservoj, surmure ekspoziciitaj glumarkoj kaj E-bildkartoj el privata kolekto. Ĉe alia flanko pendis pluraj T-ĉemizoj kaj sur la tabloj kuŝis aliaj esperantaĵoj por vendado.
En apuda ĉambro ni admiris ekspozicion de diversspecaj bildoj.
Antaŭ la inaŭguro oni prezentis kelkajn rimarkindajn ĵus eldonitajn librojn de la SAT-eldonejo, de la hispana Sateh kaj Peter Baláž prezentis sian kolekton. Poste oni legis kelkajn salutmesaĝojn.
La organizanto prezentis skize la programon de la semajno.
Dum la kongreso okazis kvar laborkunsidoj, socialaj forumoj pri Grekio, Usono, Latin-Ameriko, Mezoriento kaj Orienta Azio, raportoj pri laborgrupoj kaj jarraportoj.



Kunvenis liberecanoj, komunistoj, sennaciistoj, vegetaranoj, verduloj, LEA-komitato.



Ni estis informitaj pri Vikipedio, pri pretigado kaj farado de Sennaciulo, pri PIV, pri programo kaj planoj de E@I.



Stano Marček prelegis pri fungoj kaj pri siaj lernolibroj Esperanto per rekta metodo.
Pri la familio kaj la verkoj de la fratoj Josef kaj Karel Čapek parolis Petr Chrdle.



Aldoniĝis prelego pri ŝovinismo prezentita de Johan Derks.

Kun Peter Baláž oni diskutis pri la temo Ĉu ni pretas je grandaj ŝanĝoj.
Estis ellaborita kaj akceptita la Gvidrezolucio, en kiu oni krom aliaj gravaj punktoj substrekas la neceson respekti la liberon de penso kaj la privatecon de la homaro.
Dum la unua duontaga ekskurso ni promenis tra la urbo Nitra piede kaj trajnete ĝis la katedralo.



Ni vizitis ĝin kaj poste ni gustumis la mezepokajn trinkaĵojn preparitajn surbaze de herboj kaj kafon el glanoj spicitan per cinamo kaj kariofilo.



Poste ni vizitis sinagogon, kiu nuntempe utilas kiel koncertejo.
Kontraŭ ĝi en bele ekipita teejo ni gustumis kelkajn specialajn teojn kaj kuketojn.
Nia japana samideanino Hideko Huĝimoto sukcese prezentis kaj parolis pri la teo-ceremonio laŭ japana maniero.
La dua duontaga ekskurso kondukis nin al urbo Topolĉianky, kie ni vizitis ĉevalejon. Tie oni bredas plurajn rasojn de ĉevaloj. Inter ili troviĝas ĉevalo, simbole donacita al la brita reĝino Elizabeth II dum ŝia vizito en Slovakio la 24-an de oktobro 2008.
La reĝino kontribuas al ties zorgado kaj oni povas rimarki, ke la "reĝa" ĉevalo estas pli bone prizorgata ol la aliaj. Poste ni vizitis burgon de la 15-a jarcento. Ĝi estas nacia kultura heredaĵo.
Laste ni vizitis la vinproduktejon sen la promesita gustumado.
La tuttaga ekskurso gvidis nin al la historia urbo en meza Slovakio Banská Štiavnica. Ĝi estas konata pro minado de metaloj, ĉefe de arĝento.

Unue ni vizitis la mineralogian ekspozicion kun multegaj, diversformaj kaj raraj belkoloraj ŝtonetoj.
Post la tagmanĝo ni vizitis la minejon. Ekipitaj per kaskoj, mantelo kaj lanterno ni subteriĝis kaj paŝadis tra malhelaj koridoroj de la eksa minejo imagante la pezan laboron de tiamaj ministoj.
La urbo estas enskribita en la Unesko-listo de kulturaj heredaĵoj. En ĝi troviĝas la plej granda kripo Banskoštiavnický Betlehem, kiun kelkaj el ni ankaŭ vizitis.

Vesperaj kulturaj programeroj konsistis el prezento de slovaka popolmuziko, vingustumado kaj dancado, filmoj "Civitano 4" kaj "Ni ne plu estu sklavoj". Teatraĵon R.U.R. prezentis studentoj el la urbo Svitavy. Koncertis por ni la muzikgrupo "No problem" el Ĉeĥio kaj Attila Schimmer el Aŭstrio regalis nin per kantoj el sia repertuaro kaj akrobataĵoj.
Dum la adiaŭa vespero ni aŭskultis kantojn, gitarludadon kaj s-ino Tahira Masako el Japanio sukcese aŭkciis kelkajn esperantaĵojn.
La kongreso bone sukcesis malgraŭ la sufoka tropika vetero.
La venontjara SAT-kongreso okazos en Herzberg am Harz - La Esperanto-urbo de la 16-a ĝis la 23-a de julio 2016.




Liba Gabalda




Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda


2016
La pentrilo troviĝas en viaj manoj!
andreo.rodrigues